

Intervjuo kun s-ro Fritz Liechti pri la Filatela Servo Esperanto-Balono

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-806/258, 1979 marto 22 kaj 24

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-37/SRI-1979-37-A-3-258-806-1979-03-22-24-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-s-ro-Fritz-Liechti-pri-la-filatela-servo-esperanto-balono.mp3>

Cl.- Salutas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond, kiu intervjuas sinjoron Fritz Liechti el Zürich pri la temo: filatela servo esperanto-balono.

S-ro Liechti, do, vi kreis filatelan servon. Ĉu vi povas paroli do pri tiu filatela servo esperanto-balono?

FL.- Jes. La Filatela Servo Esperanto-Balono, mallongigite FSEB, estis kreita ĉar oni vidis ke devas esti entrepreno, instanco, kiu speciale okupas sin pri tiaj eldonoj. La FSEB do preparis diversajn tre belajn filatelajn. Grave scii estas, ke la PTT krom la marko eldonis ankaŭ tre belan unuataĝan koverton, kiun ni vendas. La FSEB siaflanke eldonas la oficialan kongreskoverton de la Universala Kongreso kun la Esperanto-marko kaj stampita de la PTT en Bern la 21-an de februaro 1979, kiu estis la oficiala eldonto de la marko. La saman koverton stampitan en Luzern, kun la aldona PTT-varbostampo por la Universala Kongreso. Ankaŭ tio estas io aparta. Tria eldono estas la kongreskoverto kun la speciala poŝtmarko "800 jarojn Luzern". Ankaŭ tio estas filatela maloftaĵo.

Cl.- Ĉu ekzistas ankaŭ pliaj filatelaj dokumentoj, kiujn vi prizorgas ?

FL.- Ho, jes ! La kulmino de ĉiuj eldonaĵoj estas la belega poŝtkarto kun la bildo de la Esperanto-balono kaj ankaŭ bildflanke la Esperanto-poŝtmarko kun la unuataĝa stampo de la PTT en Bern. Sendube tiu karto, nomita "maksimumkarto", ĉar ĝi montras samflanke la bildon de la balono kaj la markon, kiu ankaŭ portas la balonon. Ni opinias, ke por la esperantistoj tio estas tute aparta memoraĵo, kiun oni ankoraŭ neniam vidis en Esperantujo.

Cl.- Ĉu oni havos la okazon vidi la esperanto-balonon okaze de la Universala Kongreso en Lucerno ?

FL.- Certe sinjoro Gacond. Ni forte klopodas, ke la balono estu prezentita al la kongresanoj.

Cl.- Ĉu oni eble eĉ havos la okazon eniri la gondolon kaj supreniri ?

FL.- Ankaŭ tion ni planas. Dependas nur de la vetero. Detalojn oni ne jam povas diri, sed ni opinias, ke oni devus fari plurajn suprenirojn samloke, por ke la Esperantistoj, kiuj sin interesas, povu por modera prezo fari kelkminutan supreniron, kune kun la piloto.

Cl.- Ĉu vi planas ankaŭ pliajn entreprenojn dum la kongreso?

FL.- Jes. Tio estas pli malpli ankoraŭ sekreto, sed ni volonte malkaŝas ĝin nun. Tre verŝajne kune kun la Svisa Trafikmuzeo oni eldonos tute apartan balonkoverton, kiu estos transportata dum la speciala poŝtflugo kaj poste estos stampita per la speciala stampo de la PTT en la kongreso. Tiu lasta indiko estas tute freŝa, tute nova. Ĉar antaŭ du aŭ tri tagoj ni ricevis la oficialan informon ke la PTT permesas la starigon de aparta speciala poŝtoŭficejo en la kongreso kaj la specialan stampilon dum la kongresaj tagoj. Do, plia sukceso.

Cl.- Ĉu vi povas ankaŭ oferti la unuajn balonkovertojn, kiujn vi eldonis okaze de la siatempa inaŭguro de la balono ?

FL.- Jes. Ankaŭ tion ni antaŭvidas, sed mi devas diri, ke la restanta stoko ne plu estas granda. Tiuj, kiuj sin interesas ankoraŭ pri tiu koverto devus baldaŭ anonci sin.

Cl.- Kaj ĉu vi povas ion diri pri via filatela organizaĵo, do Filatela Servo Esperanto-Balono ?

FL.- Certe. Volonte mi faras tion. Ke tia entrepreno postulas ne nur multan laboron, sed ankaŭ multe da mono, tion vi certe komprenas. Ni opiniis, ke speciala entrepreno devus okupi sin intense pri tiuj taskoj. Tio estis la kaŭzo, ke ni fondis la Filatelan Servon Esperanto-Balono, mallongigite FSEB. Tiu servo intencas ankaŭ post la Universala Kongreso en Lucerno flegi tiun taskon, precipe rilate al Esperanto.

Cl.- Ĉu do per la balono vi ankaŭ transportis ekzemplerojn de viaj eldonaĵoj?

FL.- Jes, nature. Mi ĉehavas la eldonaĵojn kaj mi volonte montras ilin al vi. Estas la diversaj belaj filatelaj kovertoj.

Cl.- Unu kun la siglo 64a Unoversala Kongreso en Luzern, kaj tre tre bela skribaĵo en pluraj verdaj koloroj, ĉu ne ?

FL.- Jes, kaj tio estas la sama kun la afranko de la kvara bloko, do 4 markoj po 70 centimoj

Cl.- La unuan tagon, 21-an de februaro 1979.

FL.- Jes, tio ĝustas. Jen estas la oficiala kongreskoverto kun la esperanto-marko kaj la stampo de Bern je la 21-a de februaro.

Cl.- Jes. Do, estas tiu bildo, kiun oni trovas sur ĉiuj dokumentoj de la kongreso : la ponto de Lucerno.

FL.- Ĝuste, jes. Ankoraŭfoje la oficiala kongreskoverto stampita en Luzern, portanta ankaŭ la esperanto-markon kaj la aldona stampo de la PTT pri la Universala Kongreso en Luzern.

Cl.- 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Luzern. Estas la stampo regula dum la kongreso ankaŭ verŝajne.

FL.- Jes, tiu varbstampo estis uzata dum februaro kaj nun denove estos uzata dum la kongreso.

Cl.- Jes.

FL.- Fine ni ankaŭ preparis la koverton kun la speciala poŝtmarko '800 jaroj Luzern', la stampo de Luzern, la varbstampo PTT por la kongreso en Luzern kaj la emblemo de Luzern.

Cl.- Kaj nun kio estas pri la maksimum-karto ?

FL.- Jen ĝi estas, rigardu ! Por ni ĝi estas la vera kulmino de la filatelaj eldonaĵoj. Kion vi opinias ?

CL.- Jes, bela bildo de la flugado. Oni vidas la balonon, flavan, blankan, kun tre videbla vorto 'Esperanto', la verda stelo kaj sub la balono flugas du personoj, ĉu ekzemple vi mem ?

FL.- Ho jes. Mi ankaŭ faris longan flugon per la balono.

CL.- Kaj poste sur tiu ĉi karto estas gluita la poŝtmarko kaj ĝi estas stampita de la 21-a de februaro 79.

FL.- Ĝustas.

CL.- Do, se mi bone komprenas, maksimum-karto remontras plurfoje la saman aferon ?

FL.- Jes, maksimumkarto estas se la motivo sur la poŝtmarko kaj la motivo de la bildo estas la sama. Sed kondiĉo estas, ke la poŝtmarko estu surgluita ankaŭ bildflanke. Alie ĝi ne estas maksimum-karto. Laŭ la svisa leĝo oni kutime ne rajtas fari tion. Oni devus ankoraŭfoje afranki. Kaj se la stampoj antaŭe kaj malantaŭe ne estas la samaj, oni ne rajtas pluen sendi. Tial ni devis fari la ruĝan surskribon dorsflanke :

CL.- 'Forsendo de la karto nur en koverto permesita'.

FL.- Ĝuste.

CL.- Karaj geaŭskultantoj. Se videziras ricevi skribajn sciigojn pri la Filatela Servo Esperanto-Balono, kaj ties eldonaĵoj, vi povas skribi al Svisa Radio Internacia, 3000 Berno 15, Svislando. Kaj ni volonte sendos viajn informpetojn al s-ro Fritz Liechti, kiun vi ĵus aŭdis. Vi bonvolu ne forgesi aldoni internacian respondkuponon por kovri la respondelspezojn, kiujn havos s-ro Fritz Liechti.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis sinjoron Fritz Liechti. Ĝis reaŭdo!